

Ilona Koutny

Esperantologio kaj formado de esperanto-instruistoj en universitato

Enkonduko

Instruado de esperanto en la oficiala eduksistemo estas grava el la vidpunkto de ĝia statuso – kiel ankaŭ por etnaj lingvoj – , alie ĝi restas en la kadro de hobiaj. Esperantistoj ofte batalas por la rekono de la loko de esperanto inter la naturaj lingvoj kaj por ĝia enkonduko en la lernejojn. La ŝancoj estas pli kaj pli malgrandaj pro la deviga instruado de la angla kiel unua lingvo en multaj landoj kaj kiel eble plej frue (ekz. en Pollando jam en la unua klaso de la elementa lernejo devige aperas la angla).

Esperanto havus gravan rolon kiel propedeŭtika lingvo en la elementa lernejo, kie ĝi povus servi kiel modelo por lingvaj kategorioj, por la lingva konsciiĝo de lernantoj (kp. Fettes, Corsetti 2009) kaj por la faciligo de la sekva fremda lingvo (kp. Szerdahelyi 1976, Kovács 1981, Kovács 1997, Sonabend 1976, Corsetti 2009, Frank 2005 ktp.). Malgraŭ la esperiga utilo de esperanto, en malmultaj lernejoj ĝi estas instruata kaj malmultas ankaŭ la profesiaj instruistoj de esperanto.

Post trarigardo de la rolo de Esperanto en diversaj edukadniveleoj, la universitata instruado kaj la instruista trejnado estos en la fokuso.

1. Esperanto en la baza kaj meza edukado

La plej gravan rolon esperanto havas en la **baza instruado**:

- Ĝi taŭgas por la *konsciigo pri lingvaj strukturoj kaj kategorioj*, kiuj necesas ankaŭ por kompreni la propran gepatran lingvon al la lernantoj. La eksperimento Springboard en Anglio klare montris tion (Tellier 2013).
- *Propedeŭtika (lernfaciliga) valoro* de esperanto por sekvaj fremdaj lingvoj estas signifa kaze de novlatinaj lingvoj por gelernantoj kun aliaj gepatraj lingvoj. Okazis pluraj eksperimentoj por testi tion kiel la 5-landa eksperimento de Szerdahelyi (Sonabend 1979), kvankam ili ne estis sufiĉe grandskalaj por plene pruvi la tezon.
- Esperanto estas tre taŭga *lingvo por interkultura komunikado* jam en frua aĝo. Pro la regula kaj simpla gramatiko kaj la produktiva vortfarado eblas rapide atingi la komunikapablon, pli rapide ol en la aliaj instruataj etnaj lingvoj kiel fremdaj lingvoj. Tre rapide eblas jam komuniki kun gelernantoj el aliaj kulturoj. Pri interkultura aplikebleco de esperanto ekzistas lernejoj spertoj (Petrović 2010, Mauro La Torre lanĉis la projekton en 1998). Korespondado kun samaĝaj partneroj kaj la praktikaj interŝanĝoj donas specialan eblecon ekkoni la kulturajn diferencojn inter diversaj landoj.

En **mezgrada instruado** la lernantoj jam konatiĝis kun alia fremda lingvo, tiel la lingvokonsciiga rolo de esperanto estas malpli grava, sed eluzebila. Ĝia propedeŭtika valoro

por novlatinaj lingvoj, se ili ankoraŭ ne lernis ion el ili, estas signifa. La rolo por interkultura komunikado restas eluzinda, ja ĝi donas eblecon kontakti samaĝulojn el diversaj landoj kaj havante sufiĉan lingvonivelon akiri senperajn informojn pri ilia kulturo.

La instruado de Esperanto en lernejoj certigas bonan statuson por la lingvo. Ĝia manko montras ĝian malfortecon. Se rigardi la statistikon de Edukado.net (<http://edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=lernejajkursoj>, majo 2016) evidentiĝas, ke nur en malmultaj lernejoj – bazaj, mezaj aŭ superaj – esperanto estas oficiale instruata, eĉ se ni alkalkulas, ke parto de la kursoj ne estas tie registrita: laŭ tiu statistiko en 35 lernejoj el 21 landoj lernas 637 lernantoj en la tuta mondo!! La lecionoj estas plej ofte baznivelaĵoj kaj okazas unufoje semajne. Kelkaj el la kursoj – kvankam en la lernejo – estas nur aldonaj kursoj sen poentoj, sen kalkuliĝi al la studobjektoj. Maltrankviliga estas la fakto, ke esperanto apenaŭ estas instruata en bazaj lernejoj, kvankam ĝian lernfaciligan efikon tie eblus plej efike eluzi.

2. Esperanto en altlernejoj tra la jaroj

Germain Pirlot entreprenis la kolektadon de informoj pri altlernejaj esperanto-kursoj, antaŭ jam preskaŭ 40 jaroj. La suba statistiko montras la staton en sinsekvaj jaroj: el kiom da landoj kiom da kursoj.

landoj - kursoj

1977 : 1-a eld., dec. 1977 [21-58]
1980 : 2-a eld., jan. 1981 [19-51]
1981 : 3-a eld., jan. 1982 [15-56]
1983 : 4-a eld., dec. 1983 [17-79]
1984 : 5-a eld., dec. 1984 [22-109]
1986 : 6-a eld., jun. 1986 [28-125]
1988 : 7-a eld., jun. 1988 [24-107]
1990 : 8-a eld., jun. 1990 [19-91]
1992 : 9-a eld., jun. 1992 [23-90]
2002 : nov. [20-43]
2004 : febr. [23-63]
2006 : jan. [26-75]
2008 : jan. [24-68]
2010 : jan. [21-56]
2012 : jan. [19-50]
2014 : jan. [19-40]

La kursolisto ne estas kompleta, sed pli multe ol en Edukado.net (nur 3!), bedaŭrinde instruistoj ofte ne registras siajn kursojn. Krome ne estas apartigo inter diversaj specoj de kursoj: ĉu lingvokurso, ĉu plena studprogramo. Videble ŝrumpas la nombro de kursoj ankaŭ en la listo de Pirlot. Laŭ la landa divido el la jaro 2012:

Brazilo: 5; Bulgario: 1; Ĉinio: 6; Germanio: 3; Hispanio: 1; Hungario: 2; Italio: 1; Japanio: 5; Korea Respubliko: 3; Kostariko: 1; Kroatio: 1; Litovio: 1; Madagaskaro: 1; Meksiko: 6; Nederlando: 1; Pollando: 6; Rusio: 3; Slovenio: 1; Usono: 2

=> sume: 50, en 2014 nur 40!

3. Superagrada instruado de esperanto kaj esperantologio

La universitatan instruadon de esperanto kaj esperantologio eblas analizi laŭ diversaj kriterioj (pli detale en Koutny 2001, Koutny 2016b):

Laŭ statuso:

- ekster studprograma studrondo – plej ofte;
- oficiala kurso (kun poentoj);
- memstara studprogramo.

Laŭ tipo:

- lingvokursoj – plejparte, kaze de pli longa kurso kun iom da kulturo;
- scienca prelegaro aŭ kurso en nacia lingvo:
 - Lingvoj por *interkultura kaj internacia komunikado*. Kadre de la kurso eblas konsciigi pri problemoj kaj motivoj de komunika lingvo kaj prezenti alternativan strategion uzante planlingvon;
 - *Interlingvistiko*: artefaritaj lingvoj (planlingvoj kaj lingvoj por artaj celoj) – kiel okazas en la Universitato de Amsterdam, aŭ okazis en la Humboldt Universitato en Berlino;
 - Kiel *lingvistika modelo* dum lingvistikaj kursoj (tra esperanto montri sistemigon de lingvistikaj kategorioj, ekz. de participoj; esplori ĉu la universala gramatiko validas por planita lingvo kiel esperanto);
- faka kurso en esperanto (daŭre kadre de AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj), mallonge en Szeged pri kultura manaĝerado); daŭra problemo estas, ke fakliteraturo malmultas kaj ne aktualas.
- *kompleksaj filologiaj studoj* kaj formado de fakuloj pri esperantologio, speciale *instruistoj* de esperanto (en ELTE, Budapeŝto, 1966-2009, en UAM, en Poznano ekde 1998, eksperimento en Leipzig 2007/09);

Laŭ celo: 1) informi pri e-o kaj interlingvistiko; 2) baki esperantistojn kaj 3) formi profesiulojn, 4) Speciala tereno estas la instruado de Esperanto en universitatoj de la tria aĝo – ekzerco de mensaj kapabloj.

Kiel hungaran specialaĵon ni mencias la instruadon de esperanto al gestudentoj, sed kutime ne en universitatoj. La granda nombro da partoprenantoj (ne aperanta en la statistikoj de Edukado.net) dankeblas al la situacio, ke por akiri superan diplomon studento devas trapasi kvalifikan ekzamenon el du lingvoj. Esperanto apartenas al la lingvoj el kiuj eblas trapasi KER-ekzamenon, tiel ĝi estas akceptata en tiu kadro, se la supera lernejo ne dekretas alie.

4. Graveco de formado de Esperanto-instruistoj

Pro la logikeco kaj produktiveco de la Esperantaj reguloj, eblas regi la gramatikan sistemon kaj kompreni sufiĉe multe el esperantaj tekstoj post mallonga lernado. Tamen oni povas renkonti ankaŭ malnovajn esperantistojn ĉe kiuj la prononco (usoneca, franceca aŭ alia)

hirtigas niajn orelojn, aŭ la forgeso pri akuzativo kaj malbona uzo de (ne)transitivaj verboj, se ne paroli pri participoj ĝenas nian gramatikan senton kaj povas rezultigi miskomprenon. La facila lernebleco de iu ajn lingvo dependas ankaŭ de la diferenco inter la lernata lingvo kaj la gepatra lingvo de la lernanto, tiel ankaŭ Esperanto havas pli malfacilajn flankojn por certaj parolantoj (vd. Koutny 2016a) kaj specialaj ekzercojn.

La lingvokono bezonas maturiĝon por ke iu komencu instrui. Eĉ bona lingvokono ne sufiĉas por instruado, sed ankaŭ bonaj metodoj necesas. Iu povas havi naturan kapablon por instrui, tamen ĉiam eblas kapti novajn ideojn kiel pli efikigi kaj interesigi la lecionojn, ekkoni novajn lernmaterialojn, novajn perspektivojn, kiuj utilos al niaj lernantoj. Kaj tio estas tre bonvena kaze de Esperanto, ja la lernantoj lernas Esperanton por interese pasigi la tempon, pliaĝuloj eĉ eksplicite por ekzerci sian menson, ekz. en la universitatoj de la tria aĝo (vd. Koutny 2016b). Esperanto ne donas tujan profiton, en laborejoj ĝi ne estas bezonata, necesas io kio altiras la atenton, ebligas rapidan progreson kaj agrabligas la lecionojn, por ke la komencantoj de la kurso ankaŭ finu ĝin. Tial la instruisto de Esperanto devas esti pli bona ol instruisto de aliaj lingvoj. Necesas alta nivelo de **profesieco**.

Ankaŭ Unesko akcentas la gravecon de instruista trejnado, ĝia kvalito estas en korelacio kun la atingoj de la lernantoj (MacGill 2014). Kiom da kurskomencantoj kaj kiom da kursfinintoj?! Kaj kiom da eternaj komencantoj! Ne nur baza instruista trejnado estas grava, sed gravus ankaŭ la pluperfektigaj kursoj.

Se iu volas instrui Esperanton ne nur en la loka klubo aŭ esti reta helpanto por komencantaj Esperanto-parolantoj, sed volas instrui Esperanton oficiale en lernejo laŭ instrukadroj, tiam iuspeca diplomo, eldonota de grava institucio estas necesa, ja ankaŭ por instrui aliajn lingvojn diplomo estas postulata. Tiun **kvalifikon** povas respondece doni deca instruista trejnado kun multflanke ellaborita kaj fiksita programo, kun diplomlaboraĵo kaj fina ekzameno. Mankas profesiaj instruistoj de Esperanto, kiuj rajtus entute instrui Esperanton en lernejoj. Se en iu lando la edukadministerio decidus enkonduki Esperanton, eĉ nur eksperimente en kelkaj lernejoj, estus problemo trovi sufiĉe da kvalifikitaj instruistoj. Ni instruu kvalite kaj kvalifikite (kp. Kóródy 2009)!

Formado de Esperanto-instruistoj estas **strategie grava**. Entute la ĉeesto de esperantologio kaj interligvistiko en universitato estas grava, por montri, ke eblas science okupiĝi pri Esperanto (kp. Fiedler 2008) kaj malpliigi la antaŭjuĝojn pri sekteco de Esperanto.

Kion sciu instruisto de Esperanto?

Bona lingvokono, tio estas bona rego de la gramatiko kaj riĉa vortoprovizo, ankaŭ konvena prononco, estas la bazo por instruisto (temas pri la C1-nivelo en KER-ekzamenoj). Ankaŭ kulturaj konoj, bazaj konoj pri la Esperantaj literaturo kaj movado estas necesaj. Li/ŝi devas koni la situacion de Esperanto en la mondo por povi doni konsilojn al la freŝbakitaj Esperanto-lernantoj kiel uzi la akiritan scion kaj kiel daŭrigi. Instruisto devas ĉiam esence pli multe scii ol siaj lernantoj.

Bona instruisto konas diversajn instrumentojn kaj lernolibrojn, aplikas ilin laŭ la bezono de la instruata grupo kaj ilia celo: alimaniere lernas infanoj, junaj plenkreskuloj kaj pli aĝaj personoj. La komunika metodo kun rolludoj estas pli alloga ol la gramatika-traduka metodo kaj facile aplikeblas por Esperanto pro ties simpla gramatiko. Nuntempe la retaj ebloj estas

nepre eluzendaj. Ankaŭ la tradicia movado transformiĝas: apenaŭ funkcias kluboj, male la retlistoj kaj forumoj furoras.

Bazaj metodikaj konoj entenas kiel evoluigi la lingvokapablojn de lernantoj (lego, aŭskulto, skribo, parolo), kiel ellabori ekzercojn kaj testi la lernantojn pri la lernita materialo, kiel plani lecionon kaj kurson. Esperanta metodiko enhavas:

- la instruadon de elparolo, adaptitan al la gepatra lingvo de la lernanto,
- la instruadon de gramatiko kun speciala atento al problemoj pro la malsimileco de la gepatralingva sistemo (ekz. uzo de akuzativo por tiuj en kies lingvo ĝi ne ekzistas aŭ funkcias iom malsame),
- la instruadon de vortoprovizo kun speciala atento al la plursignifeco en la denaskaj lingvoj de la partoprenantoj, al la eluzo de esperantaj vortonestoj ktp.,
- la instruadon de bazaj kulturaj konoj pri Esperantio (gravaj aranĝoj, kulturaj centroj, libroj, kantoj, filmoj ...).

Instruisto devas koni ankaŭ la instruhelpilojn de diversaj lernolibroj, legaĵoj, muzikaĵoj ĝis filmetoj kaj kursoj en la reto, vikipedion, KER-ekzamenoj ktp.

Kompleksa instruista formado prezentas ĉiujn flankojn de la instruado kaj trejnas la partoprenantojn pri ili, konsciigas ilin pri transfero inter la gepatra kaj lernata lingvoj dum la instruprocezo, prezentas ankaŭ la lernfaciligon de Esperanto por aliaj lingvoj. La partoprenantoj mem pretigas ekzercojn, ellaboras instruplanojn kaj lecionplanojn adaptitajn al la kondiĉoj kaj celoj de la kurso, prezentas provlecionon. Fine la kursanoj pretigas laboraĵon pri elektita temo surbaze de fakliteraturo kaj propra esploro. La fina ekzameno testas ankaŭ la konojn de la instruista kandidato pri gramatiko, literaturo, movado kaj kulturo de Esperanto. Tiel okazas kadre de la Interlingvistikaj Studoj de UAM (vd. 6.).

5. Universitataj studoj – modelo de ELTE, Budapeŝto

István Szerdahelyi (1924-1987) pionira interlingvisto, novema esperantologo, elstara pedagogo, leksikografo, fondis la Esperanto-fakon de ELTE (Eötvös Loránd Universitato, Budapeŝto) en 1966 kaj gvidis ĝin ĝis sia morto en 1987. Post lia morto du liaj eksstudentinoj – Zsuzsa Varga-Haszonits kaj Ilona Koutny – kontinuas lian laboron kaj Zsuzsa Barcsay kontribuis pri metodiko kiel ekstera lekciisto. La esperanto-fako – dum kiam ĝi estis universitata fako – post unujara lingva enkonduko dum la sekvaj 3 jaroj enhavis esperantan gramatikon, literaturon, interlingvistikon, historion de e-movado kaj en la lasta jaro metodikon kun instruista staĝo en elementa lernejo. La fakon eblis elekti kiel duan aŭ trian fakon. Dum kelkaj jaroj (ekde 1972) ekzistis ankaŭ t.n. korespondaj studoj por jam laborantaj instruistoj-esperantistoj. Tiel la instituciigita instruado de Esperanto estis certigita en Hungario dank'al profesiaj instruistoj. Szerdahelyi formis kelkajn elstarajn esperantistojn, kiuj daŭrigis lian laboron, ankaŭ en- kaj eksterlande.

Esperanto estis kaj daŭre estas inter la fremdaj lingvoj elekteblaj en hungaraj lernejoj, sed la realaj kondiĉoj nun estas malfavoraj. Ankaŭ la ŝtataj lingvoekzamenoj pri Esperanto firmiĝis en la 60-aj jaroj, tio ebligis la akreditigon de la nuntempaj internaciaj KER-ekzamenoj pri Esperanto.

La *internaciaj esperantologiaj studoj* estis fonditaj en 1991, jam post la morto de Szerdahelyi, dum kiam mi instruis en la E-fako (1986-1995). Ili baziĝis sur la enlandaj korespondaj kursoj, do por bone parolantaj esperantistoj male al la tagaj studoj, kiuj akceptis studentojn sen antaŭa kono de Esperanto. Finis ĝin kelkaj homoj kun unika magistra diplomo pri Esperanto „Master in Esperanto language and literature with secondary school teaching diploma (M.A.)” (inter ili en 1993 Josef Dörr kaj Bernhard Westerhoff el Germanio, Esperantina Mirska el Pollando, Helga Farukuoye el Aŭstrio, Ikai Yosikazu el Japanio, en 1996 Stephane Dupin el Francio, Choe Tae-sok el Koreio, Morteza Mirbaghian el Irano, Michelle Gregory-Zielinski el Usono/Israelo). La internacia fako formortis fine de la 90-aj jaroj kaj la tagaj studoj en 2009, post la transiro al la bolonja sistemo en la universitato (tiam la e-fako jam apartenis al la altlerneja Pedagogia fakultato de ELTE).

6. Postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de UAM

Oficiala kompleksa formado de instruistoj en universitata nivelo – simile al la tiu de aliaj lingvoinstruistoj – okazas nun nur kadre de la **Interlingvistikaj studoj de UAM** (Universitato Adam Mickiewicz, en Poznano, Pollando). La 3-jaraj postdiplomaj studoj disponigas ne nur la bazojn de esperantologio (esperantaj gramatiko, literaturo kaj movado) kaj interlingvistiko (en malvasta senco planlingvistiko) dum la unuaj 2 jaroj, sed ankaŭ bazajn konojn pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, internacia kaj interkultura komunikado dank’ al la kontribuantaj specialistoj el la tuta mondo. Inter la konstantaj kaj laŭokazaj kontribuantoj troveblas: profesoroj Vera Barandovska-Frank, Detlev Blanke, Probal Dasgupta, Nicolau Dols Salas, Sabine Fiedler, Zbigniew Galor, Ilona Koutny, Aleksander Melnikov, Humphrey Tonkin, John Wells (pliaj vd.: <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/interlingvistiko/stabo.html>).

En la tria jaro okazas **specialiĝoj**, inter kiuj la lingvopedagogia havas prioritatan rolon, krome internacia kaj interkultura komunikado, interlingvistiko, e-lingvistiko, e-literaturo, tradukado. Fine de la tria jaro la gestudentoj defendas sian diplomlaboraĵon kaj ricevas universitatan atestilon pri la plenumo de postdiplomaj interlingvistikaj studoj kun la elektita specialiĝo. La tuta studprogramo valoras 120 ETCS poentojn (eŭropajn studunuojn), kiel kutime magistras studoj.

Surlokaj sesioj okazas dufoje jare (po unu intensa semajno en septembro kaj februaro), intertempe necesas hejma laboro por la skribaj taskoj, retaj ekzercoj kaj pretiĝo por la ekzamenoj. La studoj rekomenciĝas ĉiun trian jaron, la sekva estos en septembro 2017.

La internaciaj partoprenantoj certigas multflankan kaj komparan priparolon de la interkulturaj kaj lingvaj demandoj. Jen la konsisto de la gestudentoj komence de ĉiuj 6 grupoj.

Komencojaro	Partoprenantoj	Nombro da landoj kaj Ilia kodo
1998+99+00	8+4+4	8: BE, CZ, DE, GB, MA, (PL), SE, USA
2002	22	12: AT, BE, DE, FI, FR, HR, IR, HU, LT, (PL), RU, SE
2005	25	13: DE, FR, HR, HU, IR, IT, JP, LT, SK, SI, (PL), RU, UKR

2008	12	8: BR, FR, GR, HR, IR, KR, UKR, USA
2011	21	11: BR, CH, DE, ES, FR, HU, IT, (PL), RU, UKR, USA
2014	26	14: BR, ES, PL, SE, GB, BE, NL/RS, CZ, SK, HR, RU, HU, IR, CD (Kongo)

La universitata studprogramo havas aldonajn pozitivajn flankojn: ebligas kunlaboron ene de la universitato kun kolegoj (ekz. pri lingvopolitiko kaj interkultura komunikado), la partoprenon de gestudentoj en esploroj (ekz. leksikografio, lingvistiko), doktoriĝojn (ĵus, en marto de 2016 doktoriĝis Ida Stria pri interlingvistika temo kun mia gvido); kunlaboron kun aliaj universitatoj per Erasmus-kontaktoj (la Interlingvistikaj Studoj havis interŝanĝojn kun Brusela Unuversitato, Leipzig-a Universitato) kaj partoprenon en Internaciaj projektoj (Lingvo.info, 2012-14, lingvopolitika konferenco en Nitra, julio 2016).

7. Instruista trejnado

Eblas aliĝi al la 3a jaro de la studoj kaj kune kun la universitataj studentoj partopreni la lingvopedagogian specialiĝon, kiu estas nomata **instruista trejnado**. Por tiuj partoprenantoj krom la metodikaj kursoj okazas ankaŭ koncizaj kursoj pri gramatiko, literaturo kaj Esperanto-movado. La jara kursaro laborigas la partoprenantojn hejme pri konkretaj taskoj kiuj helpas ilian postan instruistan laboron. La akceptita finlaboraĵo kaj la fina ekzameno pri gramatiko, literaturo, movado kaj kulturo estas la postulo por la instruista diplomo de ILEI. Tiu ĉi instruista trejnado realiĝas en la kunlaboro de la Interlingvistikaj Studoj de UAM, ILEI kaj Edukado.net kaj estas kompleksa formado dum nur unu jaro.

Krom la konstantaj kunlaborantoj de la metodika kurso (Katalin Kováts, Ilona Koutny kaj Zsófia Kóródy) kontribuos en 2017 ankaŭ Duncan Charters, al la minikursoj Aleksander Korĵenkov (pri plej gravaj eventoj de la historio de esperanto), Tomasz Chmielik (pri ĉefaj periodoj kaj verkistoj de e-literaturo) kaj Ilona Koutny (tiklaj punktoj de e-gramatiko). Lingva trejnado okazas per testoj el Edukado.net. Postulo por la aliĝo min. B2 nivelo laŭ KER-ekzameno. Kiel donaco eblas partopreni en la aktualaj kursoj de la Interlingvistikaj Studoj (pri nuntempaj problemoj de e-movado: Humphrey Tonkin en 2014, Renato Corsetti en 2017, pri nuntempa esperanta literaturo: István Ertl).

Ekzistas ankaŭ aliaj eblecoj por instruista trejnado. Okazas kompleksa reta instruista trejnado (RITE) kadre de Edukado.net kun propra atestilo. Tiun formon eblas kompletigi per la surloka trejnado en Poznano. Ja por bona instrupraktiko necesas viva kontakto kaj praktika instruado sub kontrolo de gvidanto.

Esperanto-instruistojn, kursestrojn kapabligas laŭ modula instrusistemo la Germana Esperanto-Centro (Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo) en kunlaboro kun AGEI, la landa sekcio de ILEI, en Herzberg am Harz (Germanio). Diplomon eblas akiri laŭ la postularo de la Germana Esperanto-Instituto.

Krome okazas mallongaj metodikaj trejnsejtoj, lertigoj kun partoprenatestiloj dum konferencoj de ILEI kaj aliaj aranĝoj. Ili ne donas kompleksan instruprogramon, ne postulas aldonan laboron, kaj ne gvidas al fina kompleksa ekzameno. Necesus harmoniigi kaj niveligi la diversajn programojn por ke la instruista diplomo de ILEI restu altkvalita, fidela al la nivelo ellaborita kaj praktikata en universitato. La universitata formado de instruistoj de UAM daŭrigas la tradicion de la budapeŝta universitato ELTE. Estus dezirinde, ke la landaj ILEI-sekcioj sendu kandidatojn por la studoj en UAM.

Fine

Se esperantistoj serioze intencas pretiĝi por instruado de Esperanto inter oficialaj kadroj, tiam bezonatas instruistoj kun bonaj bazoj kaj iuspeca diplomo. La lingvan bazon atestas la KER-ekzamenoj, kies gravecon jam multaj komprenis. Estas tempo por ke instruantoj iĝu instruistoj de Esperanto kun solida formado kaj rekonata atestilo/diplomo. Nur sur tiu bazo eblas lanĉi la sloganon „Esperanton en lernejojn”.

Kontakto: interlin@amu.edu.pl; retejo: <http://www.amu.edu.pl/~inter/>

Bibliografio

- Corsetti, Renato 2009: La lernfaciliga valoro de Esperanto: de Szerdahelyi al Springboard to languages. En: *Koutny Ilona (red.) 2009: Abunda fonto. Memorlibro omaĝe al. prof. István Szerdahelyi.* Poznan: ProDruk & Steleto. 256-265.
- Fettes, Mark 1997: Esperanto and language awareness. En: *Encyclopedia of language and Education: Knowledge About Language.* Springer. 151-59.
- Fiedler, Sabine 2008: Interlingvistiko/esperantologio kiel fako en universitatoj – spertoj el Leipzig. En: *Ipl 2008/2: 2-15.* <http://esperantic.org/dosieroj/file/Ipl65-2-08.pdf>
- Frank, Helmar 2005: La Paderborna Eksperimento pri Lingvo-Orientiga Instruado kaj la klerigpolitikaj rekomendoj el ĝi dedukteblaj. En: *Selten, Reinhard & Frank, Helmar 2005: Por dulingveco en Eŭropo. Argumentoj kaj dokumentoj /Für Zweisprachigkeit in Europa. Argumente und Dokumente.* Paderborn: IFB Verlag & Akademia Libroservo. 31-38.
- Kóródy Zsófia 2009: Instrui kvalite, kvalifikite. En: *Koutny Ilona (red.) 2009: Abunda fonto. Memorlibro omaĝe al. prof. István Szerdahelyi.* Poznan: ProDruk & Steleto. 284-287.
- Koutny Ilona 2001: Universitata instruado kaj instruista trejnado. *IPR 2001/4: 13-21.* http://www.ilei.info/ipr/universitata_instruado.htm
- Koutny Ilona 2016a: Ĉu facila lingvo facile lerneblas? Pri la komplekseco de esperanto. En: *Gobbo, Federico (red.) 2016: Lingua, politica, cultura, Serta gratulatoria in honorem Renato Corsetti.* New York: Mondial
- Koutny Ilona 2016b: Esperanto kaj internacia komunikado en universitata kadro. En: *Belosević, Marija (red.): La arto instrui valide, valore, elkore.* Prelegaro de la Tago de lernado dum la 100-a UK, 2015. ILEI
- Koutny Ilona 2016c: Kunlaboro inter diversaguloj kadre de la Interlingvistikaj Studoj de UAM. En: *Simpozia Kajero 1.* Vroclavo
- Kovács, Márta 1981: Internacia pedagogia-didaktika eksperimento kvinlanda (1971-1974) / Nemzetközi pedagógiai-didaktikai ötországbeli kísérlet. *Diplomlaboraĵo, ELTE, Budapest, 125 p.*
- MacGill, Stefan 2014: Gravas la kvalito de Instruista Trejnado (IT) – laŭ raporto de Unesko. En: *IPR 14/2.*

- Petrović, Radojica 2010: Interkultura edukado per Esperanto. En: Blanke, Detlev & Lins, Ulrich (red.): *La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin* . Rotterdam: UEA. 585-93.
- Pirilot, Germain 2014: Esperanto-kursoj oficiale organizataj en univerrsitatoj kaj altinstitutoj.
- Smidéliusz [Kováts] Katalin 1997: Projektoj, eksperimentoj, propedeŭtika valoro. En: IPR 1997/2
- Sonnabend, G. H. 1979: *Esperanto: lerneja eksperimento*. Pisa: Edistudio.
- Szerdahelyi István 1976: Pedagogiaj valoroj de instruado de Esperanto. En: *Internacia Lingvistika Simpozio*, Kumrovec en 1975. Zagrebo. 9-18.
- Tellier, Angela (red.) 2013: *Esperanto as a starter language for child second-language learners in the primary school*. Barlaston: Esperanto UK